

Friedrich Schiller,  
Hoffnung

Es reden und träumen die Menschen viel  
von bessern künftigen Tagen;  
nach einem glücklichen, goldenen Ziel  
sieht man sie rennen und jagen.  
Die Welt wird alt und wird wieder jung,  
doch der Mensch hofft immer Verbesserung.

Die Hoffnung führt ihn ins Leben ein,  
sie umflattert den fröhlichen Knaben,  
den Jüngling locket ihr Zauberschein,  
sie wird mit dem Greis nicht begraben;  
denn beschließt er im Grabe den müden Lauf,  
noch am Grabe pflanzt er - die Hoffnung auf.

Es ist kein leerer, schmeichelnder Wahn,  
erzeugt im Gehirne des Toren,  
im Herzen kündigt es laut sich an:  
zu was Besserm sind wir geboren.  
Und was die innere Stimme spricht,  
das täuscht die hoffende Seele nicht.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805).*

*Arg-1015-2055 (2014-05-20 13:26:41)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediajn retejojn [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij\\_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin) respektive . Pri la poeto Friedrich Schiller vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich\\_Schiller](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Schiller).*

Friedrich Schiller,  
Espero

*tradukita de Vasilij Devjatnin*

Tre multe homar' kun espero en koro  
Pri vivo estonta parolas,  
Kaj ĉiam al celo feliĉa kaj ora  
Aliri plej baldaŭ ĝi volas.  
Jen mondo ekvelkas, jen ree disfloras, –  
Sed homo esperon senĉese adoras.

Espero kun li sen-aparte vivadas;  
Ĝi knabon dorlotas, junulon  
Per sorĉa radio ĝi gaje logadas,  
Konsolas ĉe tomb' maljunulon :  
Li tre lacigita per vojo de tero,  
Foriras en tombon kun dolĉa espero.

Ho, ne! ĝi ne estas elpenso malvera,  
Per revoj malsaĝaj naskita!  
Ni scias, ni sentas kun kredo sincera,  
Ke estos esper' plenumita.  
Kaj tiu ĉi sento ĉu estas kapabla  
Nin trompi en nia revaĵo agrabla?

*Traduko de la Germana poemo "Hoffnung" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (\*1862 – †1938).*

*Arg-1015-2056 (2014-05-20 12:14:13)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij\\_Devjatnin](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin). La poem-esperantigo troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.*